



## **Letero N°6**

**Novembro 2017**

**Enhavo :**

**De Junio al oktobro aperis en nia blogo la jenaj artikoloj**

**Nomumado de Respondeculoj pri sekcioj de ISAE**

**Nova Kunlaboro ekigis !**

**Nia Nova Komitatano ĉe UEA**

**ISAE havas novan retpaĝaron**

**Kampanjo por renovigi retpaĝaron de ISAE**

**Kunsido de ISAE ĉe UK2017**

**De Julio al septembro aperis en nia blogo la jenaj artikoloj :**

Titolo de la Blogaĵo	Dato de Publikigo	Kiom da fojo oni vidis la publikaĵon	Aŭtoro
Multlingvismo altigas nian toleremon	02/06/2017	434	W.Pontes
Por eviti seksavidajn masklojn, femaloj ludas mortintojn	10/06/2017	555	W.Pontes
Kial neefikaj medicinaj terapioj daure disvastigas	16/06/2017	408	W.Pontes
Scienco: Ĉu mankas al ni pridiskuti la temon?	23/06/2017	1095	W.Pontes
Aŭstraliaj sciencistoj malkovras meleagron granda kiel kanguruo	30/06/2017	667	A.Lucas
En Italujo, sesjaraĝa infano estis mortinta pro morbito.	07/07/2017	776	A.Lucas
La sesa grandskala formorto de la animaloj rapidiĝas!	14/07/2017	535	A.Lucas
La sciencisto kaj la kantisto: ĉu leciono por lerni?	21/07/2017	489	W.Pontes
Astrobiologio kaj la perspektivo de vivo ekstertera	28/07/2017	720	A.Wandel
“Antaŭ 600 milionoj da jaroj, la unuaj organismoj gigantaj koloniis la Teron.” estas ŝlosita	04/08/2017	493	A.Lucas

Korvoj scias strategie agadi tiom bone kiom ĉimpanzoj	11/08/2017	1071	W.Pontes
Liliputgranda stelo ne pli granda ol Saturno	18/08/2017	1000	A.Lucas
SCIENCA NEVERA VERO numero 5 : SCIENCA LINGVO MANKAS JE FANTAZIO	25/08/2017	838	F.Fragnani
"Alternativaj terapioj altigas la riskon je morto, sciencistoj diras" estas ŝlosita	31/08/2017	945	W.Pontes
SCIENCA NEVERA VERO numero 6 : LEKANTO ESTAS FLORO	08/09/2017	516	F.Fragnani
la Mastro de l'ringo	13/09/2017	686	F.van Hertrooij
Kredi je konspiraj teorioj donas senton de unikeco, sciencistoj asertas	15/09/2017	846	W.Pontes
La rokoj de Lyme regis, Mary Anning	22/09/2017	696	F.van Hertrooij
oni refaris la faman Milgran Eksperimenton...50 jaroj post la originalo	23/09/2017	645	W.Pontes
La ĉendanso de ĥemio	28/09/2017	1034	F.van Hertrooij
Scienco kaj Esperanto el la vortoj de Dro G. hamming, en 1956	30/09/2017	608	W.Pontes
Kion plantoj faras kiam ni ne rigardas	5/10/2017	550	F.van Hertrooij
Ĉu vi konas la Lazarus-efikon? Jen kvar specioj kiuj "resurektis"	7/10/2017	1041	W.Pontes
Graitaj ondoj tremegis la mondon, Nobel Premio por fiziko 2017	11/10/2017	773	F.van Hertrooij
Monsanto grandskale uzas sciencajn fraŭdojn, asertas Le Monde	13/10/2017		A.Lucas

**ISAE daŭre sukcesas publikigi ĉiusemajne sciencajn novaĵojn, krom aldonaj informoj kaj sciigoj pri scienco kaj esperanto.**

Legu pli ĉe <https://aktuale.sciencia-revuo.info/>

### **Nomumado de Responduloj pri sekcioj de ISAE**

**-Astronomio :** D-ro Loïc Rossi : « Mi laboras kiel planedo-sciencisto en la universitato de teknologio de Delft en Nederlando. Mi interesiĝas pri la atmosferoj de eksternsunsystemaj planedoj, sed mi ankaŭ laboras pri la planedo Venuso. Mi esperantiĝis en 2003 kaj mi aliĝis al ISAE en 2016 (se mi ne eraras). Mi ankaŭ komencis kanalon en YouTube kie mi parolas pri scienco, astronomio kaj planedo-scienco ». ( <https://www.youtube.com/channel/UCSE4dWIC9CWL4TEdqnaAEww> )

**-Kemio :** Frank Van Hertrooij estas nia nova respondeculo pri kemia sekcio de ISAE. Li ankaŭ vivigis blogon : <http://scivolemo.wordpress.com> pri kiu facebook-profilo de ISAE raportas.

## **-Twitter konto :** Aleks André

Mi estas Aleks ANDRE, matematik-instruisto en franca mezlernejo, kie la lernantoj 15–18-jaraj studas kadre de « Eŭropa sekcio » kaj franca-lingve kaj angla-lingve. En tiu mezlernejo mi prezentas enkondukon pri Esperanto, kaj mi gvidas Esperanto-klubon. Kunlabore kun Espéranto-France mi dufoje organizis prov-sesiojn de abiturienta Esperanto-ekzameno, kaj sesion de KER-ekzamenoj.

Naci-skale mi estas komitatano de Espéranto-France kaj membras en komisiono, kies celo estas aldono de Esperanto en la nedevigaj opcioj por abiturientaj ekzamenoj. Mi partoprenis en du AMO-seminarioj en la kastelo Greziljono kaj prelegis pri la taŭgeco de retaj iloj celante disvastigadon de Esperanto al la ĝenerala publiko.

Mi ja ŝatas komuniki pri kaj per Esperanto pere de la retaj iloj Telegram, Reddit, YouTube kaj Twitter. Mi estras la Twitter-konton de ISAE kaj laŭ la statistikoj tio helpas al la diskonigado de artikoloj. Ankaŭ interrete mi kontribuas al Vikipedio ekde pluraj jaroj, tradukante esperantajn artikolojn al naci-lingvaj versioj por montri la kulturon de Esperantujo al la ĝenerala publiko.

Dum la somero 2016 mi volontulis en la Centra Oficejo de UEA dum kvin semajnoj por enpaŝigi la libron de la Internacia Kongresa Universitato kaj por reklami pri la Esperanto-gazetoj tra la tuta mondo per Vikipedio kaj YouTube.

## **Nova Kunlaboro ekiĝis !**

ISAE signis kun China Report Press kontrakton por kunlaboro dank'al la ISAE estrarano Ana Ribeiro. Ni esperas ke ĝi estos fruktodone.

**Nia Nova Komitatano ĉe UEA :** Kufo esta nia kandidato por la komitata posteno post la ekŝiĝo de Francesco Maurelli. Legu pli pri Kufo ĉe :

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Uzanto:KuboF\\_Hromoslav](https://eo.wikipedia.org/wiki/Uzanto:KuboF_Hromoslav)

**ISAE havas novan retpaĝaron** kiu arigas nian blogon kaj SR. Oni esperas plifortigi SR per tiu rimedo.

Vizitu : <https://teamoisae.wixsite.com/isaе>.

Ĝi baldaŭ anstataŭigos la nunan sistemon.